

# SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

# La Espero

2019:2



Legu erojn  
de la Sveda  
Esperanto-  
kongreso

paĝoj 2-4

Nordiaj  
junuloj  
renkontiĝis  
en Malmö  
Vidu p. 5



Malnovaj  
albumoj kaj  
protokoloj  
en Sundsvall  
Vidu p. 8

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2018 • 106-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

**E-post till redaktionen:** laespero@esperantoforbundet.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se

**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/

**E-post:** eldona@esperantosverige.se

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** www.esperantogarden.se

**E-post:** info@esperantogarden.se

**Telefon:** 070 767 54 55

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperantoforbundet.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## Kongress, årsmöte och delvis ny styrelse

Årets svenska esperantokongress på Folkkulturcentrum i Hjorthagen i Stockholm besöktes av ett 30-tal deltagare: några enbart på fredagen, några enbart på lördagen, och några bara på årsmötet. Nytt för i år var möjligheten att delta på distans via dator och tjänsten Zoom (liknande Skype), vilket provades av Stella Lindblom och Lotta Lauritz som båda hade förhinder att närvara på plats. Tekniken fungerade nöjsamt, men en uppenbar lärdom är att alla som yttrar sej på mötet behöver tala i mikrofonen för att höras bra även av de som deltar från annan plats.

Vi bjöds på föredrag på temat minoritetsspråk, med anknytning till att FN utlyst 2019 till det internationella året för urfolksspråk:

- **Christer Kiselman** höll föredrag om Zamenhofs jiddischgrammatik,
- **Tatu Lehtilä** och **Zrajm Öqvist** om svenskt teckenspråk,
- **Leif Nordenstorm** om meänkieli (tornedalsfinska), finska och samiska.
- **Olof Pettersson** presenterade några punkter från föredragen från årets Språkrådsdag i april, också med tema språkliga rättigheter, och idéer esperantorörelsen skulle kunna tillämpa.



Leif Nordenstorm och Mireille Grosjean

Inbjuden gäst till kongressen var **Mireille Grosjean**, ordförande för ILEI, Internacia Ligo de Esperantaj Instruistoj, som höll tre föredrag: ett om en resa genom Centralasien med Transsibiriska järnvägen, ett om Afrika tillsammans med **Anita Dagmarsdotter**, och seminarium "Vad är en bra lärare?".

På söndagen deltog tio personer i utflykten till Postmuseum i Gamla

stan. Där höll även styrelsen sitt konstituerande möte på eftermiddagen. Några bilder från kongressen går att se på Instagram (utan inloggning) på adressen [www.instagram.com/intere\\_se/](http://www.instagram.com/intere_se/).

Med årsmötet följde som brukligt vissa förändringar i styrelsen: **Yuejin Guo** avgår som suppleant och **Arnulf Naif** som ledamot, **Lotta Lauritz** går från att vara suppleant till ledamot, och **Martin Strid** och **Lennart Svensson** valdes till nya suppleanter. Den nya styrelsen har konstituerat sej som följer:

Ordförande:	<b>Puff Östling</b>
Vice ordförande:	<b>Tatu Lehtilä</b>
Kassör:	<b>Olof Pettersson</b>
Sekreterare:	<b>Ann-Louise Åkerlund</b>
Ledamot:	<b>Lotta Lauritz</b>
Suppleanter:	<b>Martin Strid och Lennart Svensson</b>

La bruŝuro *Lingvo internacia* kiun Zamenhof publikigis en kvar lingvoj en 1887 ne estis lia unua provo krei artefaritan lingvon.

La unua provo estis *Lingwe uniwersala* (jam en 1878), la dua *Lingvo universala* (1881), la tria *La Mondo Lingo* (1886, skribata per kirilaj literoj).

*Lingvo internacia*, poste konata kiel esperanto, estis jam la kvara. Poste li priskribis ecojn de lingvo speciale adaptita al la hilelistoj (1901). Proksimume samtempe kiam li kreis sian *Lingvon universalan*, li ellaboris manuskripton pri la gramatiko de jido.

Dum la jara kongreso de Sveda Esperanto-Federacio en Stokholmo mi estis invitita paroli, kaj mia titolo estis "La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia *Lingvo universala*" (2019-05-31 11:00--12:00).

Kiel menciite Zamenhof verkis gramatikon pri jido ĉirkaŭ 1880. Mallonga raporto pri ĝi estis anonime publikigita en 1909 kaj 1910 en la revuo *leben un visenshaft* (Vivo kaj scienco), sed plene ĝi estis publikigita nur en 1982, fare de Adolf Holzhaus.

La gramatiko estas verkita en la rusa lingvo kaj science priskribas jidon, sed ne nur: la aŭtoro ankaŭ strebis al unuecigo de la lingvo, kiu estis parolata en multaj dialektoj. Temis pri elekto inter pluraj prononcoj kaj pri decidoj pri gramatikaj trajtoj. Tial la verko ne estas nur priskriba sed ankaŭ enhavas normigajn elementojn.

Lia gramatiko havas la titolon *Opyt" grammatiki novoevrejškago yazyka (žargona) (Provo de gramatiko de la novjuda lingvo (la ĵargono))*.

Zamenhof studis medicinon en la Imperiestra moskva universitato dum du jaroj, de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881, kio signifas ke, kredeble, la ellaborado almenaŭ parte okazis en Moskvo.

Li proksimume samtempe ellaboris lingvon nomatan *Lingvo universala*, kiu estas pluevoluigaĵo de lia *Lingwe uniwersala* (Varsovio 1878) kaj

antaŭiranto de *Lingvo internacia*, kiun li publikigis en Varsovio en 1887.

Mi prezentis en Stokholmo parton de la enhavo de la gramatiko kaj komparis jidon kun la lingvoprojekto *Lingvo universala*.

Menciindas jenaj punktoj:

\* La ruslingva jidogramatiko de Zamenhof, verkita dum pluraj jaroj ĉirkaŭ 1880, estas elstara lingvistika verko. Ĝi ne estas la unua gramatiko pri la lingvo, sed la unua verkita laŭ ankoraŭ nun validaj sciencaj metodoj. Ĝi anticipas esplorrezultojn pri la lingvo multe pli malfrue konfirmitajn.

\* La gramatiko montras interesan ekvilibron inter unuflanke priskribo de la lingvo kiel ĝi estas, aliflanke proponas normigon.

\* En la tri lastaj artikoloj, §§ 44–46, aperas forta admono al bona lingvouzo kaj konsiloj pri dezirinda pluevoluigo de la lingvo.

\* En Aldono I Zamenhof donas du versiojn de teksto: unu kun malbona lingvouzo, la alia kun bona lingvouzo. Montriĝas ke la plej oftaj diferencoj estas ke la malbona uzas tro da vortoj kaj formoj venantaj de la germana, dum la bona estas verkita en pli pura jido.

\* Zamenhof proponas ke jido estu skribata per latinaj literoj kun diakritaj signoj, tute simile al la pola.

\* Inter la dialektoj de jido li elektas la nord-orientan prononcon.

\* Zamenhof longe argumentas kontraŭ la uzo kaj eĉ la ekzisto de la neŭtra genro en jido. Tiu tekstopeco estas poste forstrekita kaj li simple konstatas en § 7 ke jido havas tri genrojn, menciante *der man, di vajb, dos kind*.



L. Zamenhof (1859–1917) ĉirkaŭ la jaro 1879-a

Mi prezentis komparon inter la lingvo de la gramatiko de Zamenhof kaj jido laŭ aliaj fontoj. Same mi prezentis komparon inter *Lingvo universala* (nepublikigita) kaj *Lingvo internacia* (publikigita). Ekzistas similecoj kaj malsimilecoj. *Lingvo universala* enhavas multajn mallongajn vortojn; ekzemple *bal bloa balko* estas en esperanto *sur la kontraŭa balkono*; *diantiza* estas nun *diamantoplana*.

Oni povas observi ke *Lingvo universala* enhavas elementojn devenantajn de jido, ekzemple *brivo* (en esperanto *letero*), kaj elementojn pruntitajn de la hebrea, ekzemple *semmo* (en esperanto *suno*).

Christer Oscar Kiselman



Eltondaĵo de la traduko de la Provo de gramatiko ...

Ekzistas naŭ diversaj sameaj lingvoj. Ĉiuj estas parencaj kaj finno-ugraj, sed inter si malsimilaj. Ni unue konstata ke la limoj inter la lingvoj, nenie estas identaj kun la limoj inter ŝtatoj.

La nomoj de la lingvoj estas:

1. Sud-samea, 2. Ubmeje-samea, 3. Bidum-samea, 4. Julev-samea, 5. Nord-samea, 6. Skolt-samea, 7. Anaraŝ-samea, 8. Kildin-samea kaj 9. Ter-samea.

Ekzistis ankaŭ aliaj samej lingvoj, ekzemple la Kemi-samea. Ĝi ne plu havas parolantojn, sed oni notis kelkajn vortojn en ĝi, ekzemple la preĝon "Patro Nia"

La plej grandaj estas Nord-samea kun 17 000 parolantoj kaj Julevsamea kun 2000–3000 parolantoj. Ankoraŭ tri lingvojn parolas kelkcent homoj. La ceteraj havas nur malmultajn parolantojn. La radikoj de la Sameaj lingvoj estas praurala lingvo, parolata eble antaŭ 4000 jaroj apud la riveroj Volga kaj Oka en nuna Ruslando. La sameaj lingvoj malsamas al Esperanto en pluraj rilatoj. Oni ne distingas inter "li" kaj "ŝi" Prepozicioj malmultas, sed kazoj multas. Estas ne nur singularo kaj pluralo, sed ankaŭ dualo en kelkaj el la Sameaj lingvoj. Pro tio jam en prezenco (estanta tempo) ekzistas naŭ formoj de ĉiu verbo. Aldoniĝas naŭ por preterito. Se oni aldonas kon-

diĉan modon, potencon modon, la negitajn verbojn, posedajn sufiksojn k.t.p., fariĝas pli ol 60 verbaj formoj por ĉiu verbo. La formoj tamen estas sufiĉe regule kreitaj.

En Esperanto ekzistas almenaŭ du vortoj pruntitaj el iu Samea lingvo. Temas pri la nomo de la etno "Sameo" kaj la nomo de la besto "boaco". En malnova Esperanto estis uzata la vorto "rangifero" sed nun la normale uzata vorto estas "boaco". Laŭ NPIV boaco tamen estas subspeco de rangifero. La samea vorto *boazu* tamen ne havas ekzakte la saman signifon kiel la Esperanto "boaco". La samea vorto signifas malsovaĝa, hejmigita boaco, male al sovaĝa boaco.

Por ni esperantistoj ekzistas kvar vortoj por la kvar ĉefaj mondflankoj: nordo, sudo, okcidento kaj oriento. Ankaŭ en la Nordsamea ekzistas vortoj por la kvar ĉefaj mondflankoj: *davvi*, *lulli*, *oarji* kaj *nuorta*. Tiuj ĉi kvar nocioj tamen ne estas ekzaktaj ekvivalentoj al la Esperantaj vortoj. Sameoj tradicie adaptas la mondflankojn laŭ la loka naturo. La signifo de tiuj ĉi kvar vortoj do povas esti tradukitaj: *davvi*: direkte al la montoj *lulli*: direkte al la Botna maro *oarji*: orte al la dekstra flanko de la rivero *nuorta*: orte al la maldekstra flanko de la rivero

La sekvo estas ke en la nordo kie la riveroj fluas en nord-suda direkto, *davvi* signifas nordo. Pli okcidente, kie la riveroj fluas en okcident-orienta direkto *davvi* signifas okcidento.[1]

Ni parolu tie ĉi iom pri la Nordsamea lingvo, ĉar ĝi estas la plej vaste parolata samea lingvo. Ankaŭ en ĝi ekzistas pluraj dialektoj. La dialekto parolata en Kautokeino en Norvegio fariĝis la standarda dialekto. Ĝin oni normale skribas. En Kautokeino la Nordsamea lingvo estas la plej multe parolata lingvo. Oni povas ĝin paroli en lernejoj, en laborejoj kaj en

butikoj. En aliaj lokoj, kiel ekzemple en Kiruna en norda Svedio – urbo kun ĉ. 20000 enloĝantoj – la Nordsamea lingvo estas minoritata lingvo, eĉ se oni ĝin aŭdas de tempo al tempo sur la stratoj en la urbo. Ekzistas ĉiutaga novaĵa programo en la Nordsamea. Ĝi estas televidebla en Svedio, Norvegio kaj Finnlando.

Por iom konatiĝu kun kelkaj frazoj en la Nordsamea, vidu la apudan kadron.

Ekzistas ĉirkaŭ 300 diversaj vortoj por neĝo en la Julev-samea lingvo. Ni konatiĝu kun kelkaj:

*Slabttse* estas neĝo miksitaj kun akvo, kiu nun falas. Kiam ĝi atingas la teron ĝi nomiĝas *släbtsádahka* aŭ *släbsát*.

*Skilltje*, *bulltje* kaj *tjilvve* estas tri vortoj, kiuj priskribas bulojn aŭ blokojn da neĝo kiu fiksiĝas al objektoj, al arboj aŭ al la likeno kladonio rangifera, kiun manĝas boacoj. Se pli grandaj blokoj da neĝo fiksiĝas al domo ĝi nomiĝas *bulltje*.

*Áppás* estas netuŝita vintra neĝo sen piedsignoj aŭ sen signoj de boacaj hufoj. Se mankas signoj de hufoj oni ja scias ke boacoj tie ne manĝis kaj ke povas esti kladonio rangifera sub la neĝo. Tial aparta vorto – *áppás* – por netuŝita neĝo estas bezonata.[2]

Oni observu ke la plej multaj sameaj lingvoj estas parolataj en pluraj landoj, la Nordsamea eĉ en kvar landoj: Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Ruslando. Por la Nordsamea oni interkonsentis pri komuna skribmaniero en 1978. La Julev-samea havas ĉefe komunan skribmanieron, sed kutime la literoj ä kaj ö estas skribitaj æ kaj ø en Norvegio. En Ruslando la Skoltsamea ekde 1884 estis skribita per cirilaj literoj. En Sovetio la skribmaniero variis inter cirila kaj latina alfabetoj. Ekde 1973 ĝi estas skribita per latina alfabeto.

Leif Nordenstorm

Saluton!	Bures!
Bonan matenon!	Buorre idit!
Bonan tagon!	Buorre beaivi!
Bonan vesperon!	Buorre eahket!
Ĉis!	Báze dearvan (dirita de tiu kiu foriras al unu persono)
Ĝis!	Báhcci dearvan (dirita al tiu kiu foriras al du personoj)
Ĝis!	Báhcet dearvan (dirita de tiu kiu foriras al pluraj personoj)
Ĉu vi volas kafon?	Jugat go gáfe?
Alportu akvon!	Viečča čázi!
Tenu tiun ĉi boacon!	Doala dán bohcco!
Ĉu vi volas sangobulkojn?	Háledat go don guhppáriid?
Mi kredas ke ne.	(Mon) in jáhke dan
Ĝi estas bongusta!	Lea njálggat
Mi amas vin!	Mon ráhkistan du!

**S**uno, piedirado, ludoj, kuirado, ridado, parolado – tio bone resumas nian paskan semajnfino en Malmö. Partoprenis entute naŭ personoj el Svedio kaj Danio. La loĝadon organizis mi, sed la programo estis spontana kaj ĉiu kontribuis al igi la renkontiĝon granda sukceso.

Malmö estas granda urbo taŭga por spontana programo. Kiel ejo mi elektis STF Malmö City, kie ni povis kuiru niajn manĝojn kaj tiel ŝpari monon. Invitoj estis dissendataj per retpoŝto, Amikumu, Facebook kaj Telegram. Entuziasme respondis kelkaj, kiuj ĉeestis la skandinavan kongreson pasintjare, sed ankaŭ kelkaj novuloj.

La ejo en Malmö montriĝis esti tre bona. Ĝi estis bela, surprize pura kaj la servo estis tre bona. Ni ricevis grandan subtenon el fonduso de SEF por la loĝado kaj amuzaĵo. Kelkaj el ni restis en la ejo ekde ĵaŭdo ĝis lundo. Aliaj restis tri aŭ du tagojn. La etoso en la gastigeja kuirejo estis afabla. Kelkaj aliaj gastoj scivolis pri la lingvo kiun

ni parolis kaj ni kompreneble volonte respondis iliajn demandojn.

Dum ĉi tiuj kvar tagoj ni vidis multon. La moderna muzeo havis ekspozicion pri Andy Warhol. Pro la bela vetero ni provis esti ekstere kiel eble plej multe. Ni pasigis kelkajn horojn en Kungsparken promenante kaj ludante flugdiskon. Unu tagon ni faris ekskurson al Hjärup kaj Lund. Rickard gvidis nin tra la beleaga, nove konstruita sed mezepokaspekta urboparto Jakriborg. Ni ankaŭ vizitis Lund Domkyrka kaj la muzeon Kulturen kie ni vidis du ekspoziciojn pri minoritataj grupoj: transgenruloj kaj sameoj.

En Malmö ni kompreneble ne maltrafis Turning Torso kaj la belan areon ĉe la maro kun panoramo al la ponto. Ni provis du amuzajn veturilojn: pedalboaton sur la rivero kaj elektrajn skutilojn, kiuj ni rimarkis estis tre popularaj en la urbo. Ni ankaŭ estis invititaj al Klubo Esperantista de Malmö. Tie ni rigardis ilian librokolekton kaj

laboron pri arĥivaj fotoj kaj dokumentoj. La lastan tagon ni venkis teamon de skanioj en laserbatalo.

Kiel kutime mi mem plej ĝuis la konversaciojn, sendepende ĉu ni estis en parko, trajno, kuirejo aŭ drinkejo. Ni babilis pri muziko, IJK, universitataj studoj, jutubo kaj aliaj aferoj kiuj interesas nin, sed revenanta temo estis la diferencoj inter niaj landoj. La danoj gustumis Nubbesallad kaj Påskmust kaj mi lernis ke estas tradicio en Arhuzo duŝi junulojn en cinamo je la 25-a naskiĝtago. Tatu rakontis pri finnaj kutimoj.

La tuta renkontiĝo estis bone etosa kaj mi specife ĝojis ke ĝi servis kiel unua esperantorenkontiĝo por du el la partoprenantoj. Laŭplane okazos simila renkontiĝo printempe 2020, aŭ en suda Svedio aŭ en Danio.

Vi povas rigardi pli da fotoj kaj legi komentojn pri la renkontiĝo ĉe: [esperantoforbundet.se](http://esperantoforbundet.se).

*Ingrid Antonia Berglund*

## Memore al Ebbe Vilborg

**K**un granda malĝojo mi eksciis ke Ebbe Vilborg (1926–2018) mortis.

Pri Ebbe jam multe estas publikigita, sed mi dezirus aldoni rakontojn rilatajn al matematiko, pri kiu li grave kunlaboris.

Ebbe multe helpis al Lars Mouwitz kaj mi kiam ni verkis la matematikan vortaron *Matematiktermer för skolan* (2008). Nome, li aldonis etimojn al la terminoj. Ni havis du seriojn da historia informo: la historio de la koncepto kaj la historio de la vorto (ili foje estas malsamaj). Plej multaj terminoj venas de la klasika greka kaj de latino, de lingvoj kiujn li majstris. Pensu pri liaj libroj pri latino kaj pri la klasika greka: *Norstedts svensk-latinska ordbok* (2002), *Latinska citat. Dictum et scriptum latine* (2004) kaj *Rena grekiskan. Klassiskt språk i modern tid* (2007)!

Lia helpo pri la etimologio de matematikaj terminoj estis absolute esenca, kaj la fakto ke la terminaro enhavas tiujn du seriojn de historiaj notoj estis laŭdata.

Ebbe helpis al mi krei tri novajn matematikajn terminojn: en la angla *ethmorphism*, *cleistomorphism*, *anoiktomorphism*, kiuj tre gravas en la matematika morfologio. Ili estis kreitaj de li post mia klarigo. Ili estas faritaj laŭ la modelo *isomorphism*, *homeomorphism*, *homeomorphism* kaj multaj aliaj en la angla.

Mi publikigis ilin en 2007 kaj 2010, kaj denove uzas ilin en verkata libromanusripto. En esperanto ili estas *etmorfio*, *klejstorfio*, *anojktorfio*, *izomorfio* k.t.p.

*Christer Oscar Kiselman*

## Memore al Jarlo Martelmonto

**K**un granda malĝojo mi eksciis ke Jarlo Martelmonto (1940–2019) mortis.

En majo de 1980 Jarlo kaj lia tiama kunulino Birgitta Medelius tranoktis ĉe ni en Upsalo. Li kunportis lernolibron de esperanto en la angla. Dum la nokto mi pruntis la libron – kaj tiu mallonga studado estis la komenco de mia eklerno de esperanto. (Poste mi lernis en la upsala klubo, i.a. de Ingrid Maier, Leif Nordensstorm kaj Guy Coste.) Mi aldonu ke mi estis preparata por tiu impulso, ĉar mian intereson pri lingvoj mi dankas al miaj instruistoj Karl Axnäs (1899–1984) kaj Henrik Birnbaum (1925–2002).

Birgitta (1934–1986) estis fratino de mia tiama edzino Astrid.

En 1985 Jarlo kaj Birgitta geedziĝis. Jarlo sekve estis mia bofrato.

Mi estis, kaj daŭre estas, tre danka al li pro la impulso kiun li donis al mi.

*Christer Oscar Kiselman*

# Esperantoutställning på Göteborgs universitetsbibliotek

Mellan den 7 januari och den 13 februari i år visades en liten utställning på Humanistiska biblioteket i Göteborg om esperantorörelsens tidiga historia.

Utställningen tog sin utgångspunkt i att det nu är 130 år sedan den första svenska läroboken i esperanto gavs ut. I Humanistiska bibliotekets samlingar finns många förstautgåvor av häften och böcker som belyser esperantorörelsens första årtionden, däribland ett exemplar av det första svensk-språkiga häftet; Dr. Esperantos *Internationelt språk* översatt av "G. Henriclundquist" 1889.

Inför utställningen gjordes mycket av det materialet

sökbart via den nationella webbkatalogen Libris som drivs av Kungliga biblioteket (KB). Stora delar av Göteborgs universitetsbiblioteks äldre samlingar är främst förtecknade i en lokal kortkatalog och har ännu inte hunnit läggas in i webbkatalogen. Kortkatalogen finns visserligen fotokopierad och sökbar via universitetsbibliotekets hemsida, men de flesta utomstående känner knappast till detta. Därför är det glädjande att dessa äldre esperantoverk nu även går att hitta via Libris.

I Libris kan man nu också se att KB, som tidigare var det enda svenska bibliotek som hade ett exemplar av *Internationelt språk* katalogfört, har en något annorlunda utgåva av detta första häfte. KB:s exemplar är utgivet i Lund av C.W.K. Gleerup, medan Göteborgs universitetsbiblioteks exemplar gavs ut i Warschau (Warszawa) av Ludwik Zamenhof själv (eller "L. Samenhof" som det står i häftet). I övrigt talar titel, tryckår och sidantal för att dessa två häften ändå ska vara "samma", vilket vittnar om esperantorörelsens tidiga internationella räckvidd: Redan två år efter språkets första lanserande trycktes det svenskspråkiga häftet i både Warszawa och Lund.


Också informationen om översättaren "G. Henriclundquist" har nu förbättrats i Libris tack vare att Bo Sandelin, esperantist och professor emeritus vid Göteborgs universitet, gett mig en del litteraturtips. Gustaf Henric Lundqvist, som den då nittonårige översättaren hette, verkade större delen av under den franska pseudonymen Sébastien Voirol och dog i Paris 1930. I årsboken *Ystadiana* (årgång 1987) finns en levnadsteckning om honom för den som vill läsa mer.

Verken som visades på utställningen och som kan be-

ställas fram till bibliotekets läsesal var följande:

- Julius Lotts *Die Kunst, die internationale Verkehrssprache "Volapük" schnell zu erlernen* (Wien, 1888), för att illustrera fenomenet med konstruerade språk och det mest spridda sådana innan esperanto lanserades.
- Dr. Esperantos *Langue internationale: préface et manuel complet – por Franc,oj* (Varsovie, 1887), Zamenhofs första häfte på franska, tryckt samma år som det ursprungliga ryska häftet *Mezjdunarodnyj jazyk*.
- Dr. Esperantos *Internationelt språk: företal och fullständig lärobok – por Svedoj* (Warschau, 1889), samma häfte översatt till svenska av Gustaf Henric Lundqvist.
- Dro Esperantos *Dua libro de l'lingvo internacia* (Varsovio, 1888), Zamenhofs andra häfte.
- Georg Henrik Backmans tre läroböcker *Fullständig lärobok i Verldsspråket "Esperanto"* (1892), *Lärobok i det internationella språket esperanto* (1906) och *Lärobok i det internationella hjälpspråket esperanto* (1917). Sistnämnda gavs ut samma år som Zamenhof avled och för att uppmärksamma detta hade ett porträtt på språkets upphovsman införts efter titelbladet.
- Emilie Flygare-Carléns *La literaturisto kaj lia fianĉino* (Uppsala, 1895), översättning av novellen *Literatören och hans trolovade* utförd av Otto W. Zeidlitz, det första stycket svensk skönlitteratur som gavs ut på esperanto.
- Louis de Beaufronts och Louis Couturats *Dictionnaire français-ido* (Paris, 1915), för att illustrera de reformförslag och *esperantidoj* som presenterades efter 1887.

Joakim Lilljegen,  
Humanistiska biblioteket,  
Göteborgs universitetsbibliotek



# Natura Esperanto-Festivalo med kurser på flera nivåer 12-18 juli 2019

Esperanto-Gården arrangerar Natura Esperanto-Festivalo – NEF [naturliga esperanto-festivalen] i mitten av juli i kombination med den traditionella sommarkursen, undervisning för alla, allt från nybörjarnivå till litterär nivå. Särskilt program och undervisning för barn. Lärare är Annie Grente, Arnulf Naif, Martin Strid och Anna Ritamäki-Sjöstrand. Selma Lagerlöfs Mårbacka och världens konstaterat mineralrikaste plats

Fredagen den 12 juli är ankomstdag, så vi börjar officiellt med en måltid kl. 19 (men det finns mat också tidigare om man är på plats och vill äta), och torsdagen den 18 juli är avresedag (då serverar vi kombinerat morgonmål och lunch fram till ca. kl. 12). Vi hjälper gärna deltagare att samåka eller hitta bästa möjliga förbindelse till Esperantogården. Vi hämtar i Filipstad, Hällefors eller Hagfors om ingen lämplig direkt förbindelse finns till Lesjöfors just den tid ni har möjligheten att komma.

Esperanto-Gårdens styrelse / Anna Ritamäki-Sjöstrand

## Deltagaravgift inklusive program, övernattning och måltider

Deltagaravgift utan rabatt 3400 SEK

Tillägg för enpersonsrum 1500 SEK  
Hyra för lakan och handduk 100 SEK

## Rabatter

Ungdom 13-17 år, studerande,  
pensionär, arbetslös -1000 SEK  
7-12-åring -2000 SEK

Deltagande och besök under kortare  
period är möjligt. dygnspris: 850 SEK

**VIKTIGT** Din ekonomiska situation ska inte vara ett hinder. Är du intresserad av deltagande – hör dig för om en personlig rabatt för dig eller familjen. Det viktigaste är att alla, som är intresserade av att lära sig och njuta av internationell samvaro på esperanto, har möjligheten att göra det i vår alldeles egna kursgård i natursköna Värmland.

## Kotizoj inkluzivantaj programon, tranoktadon kaj manĝojn

Nerabatita kotizo 3400 SEK

Aldono 1-persona ĉambro 1500 SEK  
Luo de littuko kaj bantuko 100 SEK

## Rabatoj:

Junulo 13-17-jara, studento, pensiulo,  
senlaborulo: -1000 SEK  
7-12-jara: -2000 SEK

Partatempa partopreno estas bonvena:  
tagnokta kotizo 850 SEK

GRAVE Via financa situacio ne estu obstaklo. Se vi volas partopreni – informiĝu pri ebla persona rabato por vi aŭ via familio. Plej gravas ke ĉiu, kiu interesiĝas, povu lerni kaj ĝui internacian esperantorenkontiĝon en nia propra kursejo en belnatura Vermlando.

## ESPERANTO-GASTEJO



Annie Grente de Francio atentos pri infanoj dum NEF kaj prezentos sian Esperantodomon en Kreta.

Annie Grente som undervisar barnen har ett esperantohus på Kreta

**F**ör den som vill delta i esperantokongressen, UK i Lahtis, som börjar lördagen den 20 juli, erbjuds en gemensam exkursion med intressanta stopp i Sverige och avresa med nattfärjan från Stockholm fredag kväll (19/7). Det är möjligt att ansluta sig till resan var som helst. Är du det minsta intresserad att kanske välja det här alternativet ta kontakt med Esperanto-Gården så kommer vi överens om detaljerna.



Anmälan Aliĝo  
Telefon/telefono: +46(0)70 767 54 55, aŭ Epost/rete: [info@esperantogarden.se](mailto:info@esperantogarden.se)

## Ange:

- Namn
- E-post
- Telefon
- Ålder
- Postadress
- Esperantonivå
- Ange diet eller andra behov (exv. önskemål om rum, önskemål om hjälp att hitta kollektivtrafikförbindelse)
- Eventuellt intresse att bidra till programmet

Betala gärna 1000 SEK eller hela summan vid anmälan. Vi tar naturligtvis även emot gåvor till kursgården.

## Informu:

- Nomo
- Retpoŝto
- Telefono
- Aĝo
- Poŝta adreso
- Lingva nivelo
- Ebla dieto kaj aliaj bezonoj (ekz. deziraj rilate al ĉambro, helpo trovi horaron)
- Eventuala intereso kontribui al la programo/

Ni aprezas se vi pagas 1000 SEK aŭ la tutan sumon je aliĝo. Donacoj estas alte aprezataj.

Esperantogården i Lesjöfors,  
Plusgiro: 4440245-1

Internacia formo de la kontonumero: IBAN: SE26  
9500 0099 6042 4440 2451 BIC (SWIFT): NDEASESS

Arnulf Naif, jen instruanta en la manĝejo dum pasinta evento, estas inter la instruistoj.

I Esperanto-Gårdens matsal och i andra utrymmen går det bra att undervisa, här en av årets lärare Arnulf Naif.





- Bildoj.
- 1 Kafumado kaj babilado.
  - 2 Malnovaj instruaj ŝildoj montritaj de Gunnar Farm, Åke Näsholm kaj Georgo Verdagero.
  - 3 Informo pri la lingvo skribita antaŭ multaj jaroj.
  - 4 Kongesaj glumarkoj 1934.
  - 5 Malnova gazetartikolo.

Nia klubo en Sundsvall estas malnova. Fondita en aprilo 1929, do nun 90 jara. Ni planas tion festi el la ejo de "Medelpads Arkiv". Restas protokoloj kaj gazet-artikoloj de 1930 kaj poste. Interese legi la malnovajn protokolojn skribitaj mane per tre bela manskribo. Restas ankaŭ multaj gazetartikoloj kun raportoj pri esperantistoj vizitantaj en nia urbo, ekzemple usonano de Hollywood kiu rakontis pri la vera labortago en la urbo. Interesaj travivaĵoj eksterlande de niaj membroj dum universalaĵ kongresoj ekz. en Ĉinio, ricevis lokon en la lokaj gazetoj de Sundsvall. Tiampe estis tri lokaj gazetoj.

Mi mem estas membro en la klubo de post 1955, kaj mia patrino jam de la komenco. Post la jaro 2000 ni havis periodon iom stagnan kun samaj malnovaj membroj kun daŭraj

kontaktoj inter la membroj kaj kunvenoj kelkfoje jare en niaj hejmoj.

Nuntempe, post aliĝo de pluraj novaj membroj, ni ekhavis novan problemeton, kiam la partoprenantoj dum la kunvenoj superas 12 personoj, malfacilas trovi lokon en la privataj hejmoj. Nur somere ni trovas lokon en niaj somerdomoj kiam eblas parte resti ekstere. Feliĉe la studorganizo Bilda, kie ni havas niajn studkursojn senkoste proponas sian studejon por niaj kunvenoj.

La 6an de aprilo ni pasigis agrablan kunvenon kun 14 partoprenantoj. Ĉiuj provis laŭ propra sperto interparoli esperante en gaja etoso kaj manĝis de kunportitaj manĝaĵoj nodfeston (knytkalas). Post paroloj pri la problemo ke la banko altigis la koston al 1000 kr po jare por la organizo Gunnar Farm montris mult-

egajn malnovajn esperanto-librojn por senkosta fordono al la klubmembroj.

Pluraj interesaj libroj kaj albumoj kun malnovaj fotoj kaj gazettelranĉaĵoj kun variaj temoj. Parte estas kolekto de lia patro Torsten kiu dum multaj jaroj estis prezidanto de la klubo. La emo ricevi librojn estis forta. Studŝildojn, grandajn kaj malnovajn sed tamen iom uzeblajn Gunnar donis al nia instruisto Åke. La malnova tempo do ekhavis ligon al la nova.

Ingrid Näsholm  
prezidantino de la klubo  
tfn 070-3498653  
sibirisk katt@isrosen.se

PS se iu speciale interesas pri aliaj samtempaj artikoloj pri la UK en Stokholmo ktp ili povas min kontakti.

